Decembro 87

# La cirkulero 2013

CENTRE CULTUREL ESPERANTO TOURAINE
Maison des Associations, Halles de Tours
Place Gaston Paillhou
37000 TOURS
02-47-55-20-10 ou 02-47-20-43-95

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

**http://esperanto-tours.1s.fr**

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Dominique Baron, 15, impasse Marat, 37700 SAINT PIERRE DES C. ; 02 47 44 62 12 |
| Vicprezidantoj | Juanita Turbillon, 4, jardin Ockeghem, 37000 TOURS ; 02 47 20 43 95 |
| | Pierrette Formen, 52, rue de l'Auberdière, 37510 SAINT GENOUPH ; 02 47 45 51 58 |
| Kasisto | Hélène Alessandri, 3, rue des Richardières, 37230 LUYNES |
| Sekretario | Jacques Gaumé, 6, imp. des Primevères, 37390 CHANCEAUX S/CH. ; 02 47 55 20 10 |

## KIO OKAZIS ĴUSE ?

**Sabaton, la 28an de septembro:** ESPERANTISTA RENKONTO EN CHANCEAUX. Malfeliĉe la pluva vetero devigis nin "pikniki" en la domo. Ni estis nur 8 personoj. Ĉiu elektis inter la libroj de André, tiujn, kiuj plaĉis al si. Post la veno de du membroj, kiuj ne povis ĉeesti dum la renkonto, restas ankoraŭ multaj libroj por disdoni.

## VENONTAJ GRAVAJ DATOJ

**Sabaton, la 11-an de Januaro 2014**, sabata renkonto, **salono 107, je la 14-a 30** : ni spektos la filmon de Dominique Gautier "Esperanto" kaj ni partigos la tradician reĝan kukon.

**Sabaton, la 1-an de Februaro, salono 120, je la 14-a 30, ĝenerala asembleo. (vi ricevos konvokilon meze de Januaro**

**Sabaton, la 22-an de Marto, salono 116, je la 14-a 30, sabata renkonto. Ni anoncos la temon en venonta cirkulero.**

## QUE S'EST-IL PASSÉ RECEMMENT ?

**Samedi 28 septembre :** RENCONTRE ESPERANTISTE A CHANCEAUX. Malheureusement le temps pluvieux nous a obligés à "pique-niquer" dans la maison. Nous étions seulement 8. Chacun a choisi parmi les livres d'André, ceux qui lui plaisaient. Après la venue de deux membres qui ne pouvaient être présents à la rencontre, il reste encore beaucoup de livres à distribuer.

## PROCHAINES DATES IMPORTANTES

**Samedi 11 janvier 2014,** rencontre du samedi, **salle 107, à 14h30** : nous regarderons le film de Dominique Gautier "Espéranto" et nous partagerons la traditionnelle galette des rois.

**Samedi 1er février, salle 120, à 14h30, assemblée générale. (vous recevrez une convocation à la mi-janvier)**

**Samedi 22 mars, salle 116 à 14 h 30, rencontre du samedi. Nous annoncerons le thème dans une prochaine circulaire**

NIAJ KURSOJ | NOS COURS

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Lundi** | 1er degré | 18h45 - 20h15 | Salle 119* |
| | 2ème degré | 17h30 - 18h45 | Salle 119* |
| **Mercredi** | 3ème degré | 17h– 18h | Salle 107* |
| | Conversation | 18h - 19h30 | Salle 107* |

***vérifier le n° de la salle sur le tableau blanc du palier**

**Le Café des Langues** se tient tous les lundis
à partir de 20 h 30
au Café LE PALAIS (1er étage)
15 place Jean Jaurès à TOURS

## Greziljono proponas

**Eniru la aventuron kun la Eta Arturo!**

Inter la aktivaĵoj proponitaj ĉi tiun jarfinon en Greziljno ekbrilas : la muzika komedio « La Eta Arturo » Dum 4 tagoj, ni muntos la teatran parton. Ĉiu bonvolu legi la tekston (ĉiligite france, nun esperantigata) kaj identiĝi al iu el la roloj. Alportu la taŭgan kostumon ĉar ni havas nek kostumiston nek kostumejon. Kiam vi elektis vian rolon, bonvolu sciigi min plej rapide:
isabelle.nicolas2@gmail.com
Mi atendas vin senpacience por tiu bela kreaĵo inter-generacia, inter-nacia kaj precipe neforgesebla !
Pulĉinelo, Arlekeno, juna viro, Dio de la Vento kaj maljuna maristo, aliĝu al la Eta Arturo!
Rigardu la programon de la Jarfina Festego por malkovri la kompletan menuon!
**http://gresillon.org/jarfino**

**Entrez dans l'aventure avec le Petit Arthur !**

Parmi les activités proposées en cette fin d'année à Grésillon : la comédie musicale « Le Petit Arthur » est au menu des festivités. En 4 jours, nous monterons la partie théâtrale. Chacun est invité à lire le texte (pour le moment en français, la traduction espéranto est en cours !) et peut commencer à s'identifier à un personnage. Apportez avec vous la tenue vestimentaire correspondante car nous n'avons ni costumière, ni costumerie. Dès que vous avez choisi votre personnage, merci de me le faire savoir au plus vite : isabelle.nicolas2@gmail.com
Je vous attends impatiemment pour cette belle création intergénérationnelle, internationale et surtout inoubliable ! Polichinelle, Arlequin, jeune homme, Dieu du Vent et vieux marin, inscrivez-vous et venez rejoindre le Petit Arthur !
Regardez le programme du Grésiveillon pour découvrir le menu complet !
**http://gresillon.org/nouvelan**

# Jarfina FESTego

**Jarfina FESTego** kun novjara **Silvestra FESTeno**
- Alveno ekde sabato, la **28**a de **decembro** 2013, posttagmeze
- Foriro ĝis ĵaŭdo, **2**a de **januaro** 2014, posttagmeze

Maison Culturelle de l'Espéranto Grésillon
St. Martin d'Arcé
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU France
kastelo@gresillon.org
+33-2.41.89.10.34

**Prezoj**

○**Tuta restado** de la 28a de decembro ĝis la 2a de januaro : 200...400 €
○Reduktita ĉioinkluziva prezo valida ĝis la **2a** de decembro 2013
○**Silvestra** (Novjara) **festeno** (inkl. vinoj) kaj masko-balo (sen tranokto) : 40 €

○**Alia periodo** : laŭ la tarifoj + festena suplemento 25 €
- **Por aliĝi**, Atendu nian konfirmon pri disponeblo de la petita ĉambro.
- Kunportu : Muzikilon, kantaron, E-vortaron, varman pulovron kaj piĵamon kaze de arkta frosto.

- **Programo** (provizora, atendanta viajn proponojn !)
- Distraĵoj
  - Konkurso pri ŝercoj en Esperanto, *preparu viajn !*
  - Ateliero de Julkantoj plurlingvaj (?)
  - Luphomoj (fama grupa paroliga ludo)
  - Teatrumi la muzikan komedion « **La Eta Arturo** ».

Atelieroj de provludado matene kaj posttagmeze. Spektaklo en adiaŭa vespero. Bonvenas etaj kaj grandaj, komencantoj kaj spertuloj pri teatro, muzikistoj aŭ ne. ĉiu trovos sian lokon, sian rolon en la granda aventuro kun la Eta Arturo.

- Prelegoj
  - Seminario pri ĵurnalista laboro (Alfred)
  - La Esperanto-ekzameno (François ?)
  - Franca Signolingvo, komunikado kun surduloj kaj aliaj handikapoj (Ana ?)
- Lingva kleriĝo
  - Kurso por komencantoj/komencintoj (?)
  - Skrablo kun Esperanto-vortaro
  - Biblioteko kaj libroservo je via dispono
- Korpa moviĝo
  - natur-instru-pado tra la parko kaj arbaro de Greziljono….k.t.p.
  - Tablotenisa konkurso (sub la hangaro)
  - Vizito al la loka bazaro en Baugé
  - Vizito de la Vera Kruco de Anĵuo kaj la urbo Baugé
- Por infanoj
  - Desegni fantom-maskojn (akvokoloroj, feltokrajonoj)
- Vesperoj :
  - Interkona vespero (sabate)
  - Internacia vespero kun viaj artaj kontribuoj
  - Luda vespero (societaj ludoj sur pluraj tabloj)
- Silvestra Nokto (marde) kaj NovJaro
  - Preparo de la salonoj (kunportu ornamaĵojn)
  - Longa festeno (vidu menuon malsupre)
  - Silvestra balo (ali-vestu vin per masko kaj kostumo, kiel fantomo aŭ feino)
  - Ĉampano noktomeze por bonvenigi la novan jaron
  - Longa matena brunĉo kun kafo, teo kaj babilado
  - Novjara promenado tra la kastela parko